**PAIVA NETTO** skribas "Apokalipso kaj Genaro de la Universo"

# BONA VOLO

www.bonavolo.com

JARKOLEKTO 26 • N-ro 70

ELEVAÇÃO

# ESPERANTO

## 125 JAROJN VIVANTA KAJ KRESKANTA

**MONDA POKALO** Templo de Bona Volo estis elektita de la Konsilio pri Disvolvo de Turismo en Braziljo, ĉefurbo de Brazilo, kiel unu el la dek monumentoj por la turisma itinero de la Mondpokalo 2014 okazonta en Brazilo.



**Vizitu LBV-on de Novjorko kaj vidu kiamaniere tiun gravan idealon viviĝas en la Granda Pomo!**

## Ni kredas, ke ekzistas solvo por la mondaj problemoj:

# Bona Volo

**Eksciu kiel oni praktikas ĉi tiun proponon, kaj per kiu maniero vi povas helpi.**

PACO SUR LA TERO AL LA HOMOJ DE BONA VOLO

LBV

**BRAZILO** Centra Sidejo: Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • San-Paŭlo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com

**USONO** 36 W 44th Street Mezzanine (inter la 5a kaj la 6a Avenuoj) • Manhattan • Novjorko • 10036 • Tel. (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org • www.facebook.com/legionofgoodwill

ELEVAÇÃO

BONA VOLO

26-a jarkolekto • N-ro 70

**BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, la 16-an/3/2006, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.**

**DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO:** Francisco Periotto MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

**ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ:** Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

**SKIPO DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Adriane Schirmer, Ana Paula de Oliveira, Angélica Periotto, Cida Linares, Fabiano Henrique, Felipe Duarte, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, José Roberto Tenório da Silva, Leila Marco, Letícia Rio, Maria Aparecida da Silva, Neuza Alves, Paulo César Pereira, Paulo Sérgio Viana, Raquel Bertolin, Rosana Bertolin, Silvana Bosso, Walter Periotto kaj Wanderly Albieri.

**KOVRILO:** Helen Winkler

**GRAFIKA PROJEKTO KAJ KOMPOSTADO:** Diego Alves, Helen Winkler kaj Kátia Borba.

**ĈIUJ RAJTOJ DE TIU ĈI ELDONO REZERVITAJ DE ELDONEJO ELEVAÇÃO:** Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brasil [Brazilo] • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3225-4969 • www.bonavolo.com




## TRAKTAJÔ PRI LA SPIRITE REVOLUCIA, NOVA ORDONO DE JESUO

Instruis Jesuo, la Ekumena Kristo, la Dia Ŝtatisto: *"Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos Amon unu al alia. Jen estas mia Ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel Mi vin amas. Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj. Vi estas miaj amikoj, se vi faras tion, kion Mi al vi ordonas. Kaj Mi tion ordonas: vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Mi jam ne nomas vin sklavoj, ĉar la sklavo ne scias, kion lia sinjoro faras; sed Mi nomis vin amikoj, ĉar ĉion, kion Mi lernis de mia Patro, Mi sciigis al vi. Vi ne elektis min, sed Mi elektis vin, kaj starigis vin, por ke vi iru kaj donu bonan frukton, kaj ke via frukto daŭru; por ke la Patro donu al vi ĉion ajn, kion vi petos de Li en mia nomo. Tion Mi ordonas al vi: ke vi amu unu la alian, kiel Mi amas vin. Kiel la Patro min amas, tiel Mi ankaŭ vin amas. Restadu en mia Amo".*

**(Aranĝita de Paiva Netto, akorde kun la Evangelio de la Kristo de Dio, laŭ Johano, ĉapitro 13:34 kaj 35 kaj ĉapitro 15:12 ĝis 17 kaj 9)**

4 **Mesaĝo de Paiva Netto** | Apokalipso kaj Genaro de la Universo

8 **Leteroj kaj retpoŝtoj** | Esperantistoj skribas al BONA VOLO

10 **Registro** | Esperanto enfokusigita

20 **Speciala** | Esperanto: 125-jarojn vivanta kaj kreskanta!


26 **Edukado** | Ensocietiĝo pere de bonkvalita instruado

32 **Esperanto tra la mondo** | Esperanta novaĵservo

34 **Templo de Bona Volo** | TBV estas oficiala turisma vojiro de la Monda Pokalo 2014

38 **Junula Agado LBV** | La Granda Homar-familio

40 **Soldatetoj de Dio** | Fotogalerio kaj aktivecoj












# Apokalipso kaj Genaro de la Universo

## La Libro de Revelacio antaŭdiras ian novan Ĉielon kaj ian novan Teron




José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalisto, radioprelegantо, komponisto kaj poeto. Li naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI–Inter), ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵanejro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵanejro, de Beletra Akademio en Centra Brazilo kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Laŭ **Cicerono** (106-43 a.K.), Profetaĵoj havas universalan gravecon: *"Ĉiu popolo, eĉ se plej rafinita kaj klera, nepre kredas la kapablon de iuj homoj antaŭvidi la estontecon"*.

Temas do pri temo, kiu ne perdas sian oportunecon, malgraŭ mokoj de iuj homoj.

Multaj ankoraŭ pensas, ke Apokalipso indikas la limon por vivo sur nia mondo. Tio estas eraro.

La mosea Genezo, la unua libro de la Biblio, per ĉifroj raportas la ekaperon de la Tero. Koncerne la Kosmon, eble sub malsama formo, ĝi ĉiam ekzistis, eĉ antaŭ la *Granda Eksplodo* de la fama **George Gamow** (1904-1968). Se ne, kio ekzistis antaŭe? (Ĉu oni povus proponi esploron pri la genaro*[1] de la Universo?) Nun, ni konsultu la Libron de Revelacio, kaj ni konstatos, ke ĝi ne antaŭdiras la finon de la homa ekzistado; male, la teksto finiĝas per beno:

*"La graco de la Sinjoro Jesuo estu kun ĉiuj sanktuloj. Amen"* (Apokalipso, 22:21).

Kaj krome: en la ĉapitro 21-a, oni trovas novan Jerusalemon, novan Ĉielon, novan Teron, post ŝanĝo neniam ajn vidita, kaŭzita de la Homaro mem, kiel mi ofte emfaze diradas. Ne temas pri ia Dia puno; tamen, temas pri rikolto deviga, post libera semado.

### Homaj agoj kaj ties konsekvencoj

Kiam mi diras, ke oni devas ne timi Apokalipson, tiam mi

*[1] **Genaro** — Tuta genetika organizo de iu Estulo.



Ne pri Apokalipso ni devas zorgi; male, ĉar ĝi estas, por tiuj, kiuj legas ĝin sen antaŭjuĝoj, bela dia averto, farita antaŭ du mil jaroj. Teruraj ja estas frenezaj homaj agoj, ĉu individue, ĉu kolektive.

ne asertas, ke tiuj aferoj, kiujn homoj kaj popoloj starigis, ne prezentos siajn tragikajn aŭ bonfarajn rezultojn. Ĉu vi volas tipan ekzemplon? Kion ni daŭre faras al la Naturo! Ĉio tio kaŭzos gravan konsekvencon, kio cetere jam ekokazas... Ne vidas tion nur tiu, kiu ne emas vidi... Feliĉe, ekologia konscio iom post iom disvastiĝas en la mondo. Kaj tio estas bona. Ni ne rajtas bruligi nian kolektivan loĝejon. Kaj same ne fari el ĝi domaĉaron. Kiu estas tiu domo, infanoj?!*[2] Ĝi estas la Tero!

## Averto de sciencistoj

Ĉu vi memoras la averton de diversaj sciencistoj, se mi ne eraras en la jaro 1983, unu el la plej varmaj jaroj en la Historio, pri la forceja efiko post mezlonga tempo, kiun tuj neis aliaj sciencistoj, supozeble kontentigantaj interesojn de potencaj ekonomiaj grupoj, kiuj ne emas eĉ iomete malgrandigi siajn gajnojn? Ĉi tiuj lastaj forgesas, ke ĉi-foje eble ni forperdos nian loĝejon mem, la Teron. Faktoj nuntempe havas reeĥon tutmondan, tio estas, tujan. Tamen, ŝajnas, ke iuj homoj insistas fermi la okulojn al tiaj teruraj rezultoj. Tial mi preferas apogi forte avertan konkludon de la unuaj menciitaj esploristoj, interalie ĉar la malagrablaj ŝanĝoj jam plene okazadas kaj konsiderinde damaĝas, se ne alvenos energia, dinamika decido flanke de registaroj, sub postulo de civitanoj, kiuj finfine vekiĝas...

Ankaŭ tiu vekiĝo estas parto de la profetaĵoj. Ni observu la elmontran vorton de Apostolo Paŭlo, en lia Epistolo al la Romanoj, 13:11 kaj 12:

*"Kaj tion faru, sciante la ĝustan tempon, ke nun estas la horo por leviĝo el dormo; ĉar nun nia savo estas pli proksima, ol kiam ni ekkredis. La nokto jam finiĝas, kaj la tago alproksimiĝas; ni demetu do la farojn de mallumo kaj surmetu la armilojn de lumo."*

Urĝas montri, ke profetaĵo ne estas sinonimo de skurĝo, sed elmontro pri rilatoj inter kaŭzo kaj rezulto. Ĝi estas la rezultato de tio, kion ni antaŭe faris, ĉu bona, ĉu malbona. Necesas lerni tion por fari ilin elemento por konscia progreso, tiel ke ni transformu nin mem, plene prudentaj, kiel agantoj por nia propra estonteco. Ne vanas rememorigi ĉi tiun penson de la franca verkisto **Joubert** (1754-1824): *"Kiam el iu nia misfaro rezultas malfeliĉo, tiam ni akuzas la destinon".*


## Ĉu timi Apokalipson?

Leĝo pri Kaŭzo kaj Rezulto estas ĉioscia, tiel ke ĝi donas al ĉiu homo laŭ liaj propraj agoj. Ne ĉiam ni konstatas, ke ĝi tuj efikas, ĉar ĝia agado estas natura, deinterna. Tial ni malofte sukcesas percepti ĝian meĥanismon. Je ĝusta momento, laŭ la Horloĝo de Dio, ni ĉiuj devos rikolti tion, kion ni semis. Sekve, ne pri Apokalipso ni devas zorgi; male, ĉar ĝi estas, por tiuj, kiuj legas ĝin sen antaŭjuĝoj, bela dia averto, farita antaŭ du mil jaroj. Teruraj ja estas frenezaj homaj agoj, ĉu individue, ĉu kolektive. ●

*[2] **Infanoj** — La predikojn de Paiva Netto ĉiam prestiĝas mirinda kvanto da infanoj kaj junuloj, interesitaj alproksimiĝi al instruoj, kiuj venas de Dio. La aŭtoro de ĉi tiu artikolo traktas ilin tre respekteme kaj digne. Li kutimas diri, ke *"infano ne estas ia objekto por konsumado".*

# Nemalhavebla!

## Paiva Netto:
brazila verkisto kun pli ol
**4,7 milionoj da libroj venditaj.**




# Mendu la vian nun!

www.bonavolo.com




“Grandan dankon pro la verko de S-ro Paiva Netto “Homa maŝino kaj oleo de sento” [aperita en la revuo BONA VOLO *Edukado*], kiun mi ricevis antaŭ du semajnoj. Riĉe ilustrita, interesa laŭ enhavo, mi, malgraŭ febla vidkapablo, volonte tralegis ĝin kaj tradukis rusen, por sciigi la respublikan ministerion de klerigado pri agado kaj sperto de LBV koncerne de edukado. Kun dankemo oni promesis legi la tradukaĵon kaj poste konkludi kaj resumi.”

**Jurij Kivaev (Rusio)**



Fotokopio de Portalo Bona Volo: www.bonavolo.com

“Mi ege aprecas laboron de LBV, senton por altigi la homaron al la kristalpura steleto de Templo de la Bona Volo! Vivu la Legio de Bona Volo! La tuta kolektivo!

S-ro Paiva Netto al kiu mi deziras multan sanon, longan vivon. Ke li povu kontinue ĉirkaŭbraki la popolon de la mondo, protekti la infanojn, plenkreskulojn, bezonulojn, donante al ĉiuj tiel bildan lumon de la distanco radiigante la tutan Teron, vigligante, pere de ĉiuj agoj de LBV, niajn korbatojn por estu ni pli bonaj, el bona volo fari bonajn faktojn, kontentigante, nutrante nian humanan senton.”

**Jolanda Józsi (Rumanio)**

“La laboro, kiun faras la LBV estas grandega, bezonata kaj imitinda! Gloron al vi.”

**Firdaus (Taĝikio)**

“Gratulon pro tiu bela riĉilustrita periodaĵo! Grado 10! Mi sendube diskonigos ĝin!”

**Aloísio Sartorato (Brazilo)**

“Samideano Paiva Netto kiel homo de malfermitaj brakoj kaj koro, certe trovis en nia lingvo [Esperanto] ion, kiu parolis profunde al lia animo kaj sentema koro. Mi kun plezuro jam sendis al miaj geamikoj esperantistoj tiun e-revuon kun rekomendo, montrante ke ni devas esti dankema al LBV pro via laboro favore al Esperanto.”

**Manoel Pereira de Oliveira (Brazilo)**

“Mi ĝuante vidis kaj legis pri BONA VOLO *Edukado*. Mi sincere volas gratuli vin ĉiuj por la memorinda kaj historia laboro. Mi komprenas, ke vi senlace laboras por la monda paco. (...) Mi elkore volas diri, ke BONA VOLO estos brila luno de la mondo. Kiel ĉefdeligito de Nepalo, antaŭa prezidanto de NEspA kaj instruisto de universitato kaj kiel poeto mi bone komprenas kaj vidas la bonan futuron de LBV.”

**D-ro Mukunda Pathik (Nepalo)**

# Oficejo de LBV en Nov-Jorko akceptas viziton de esperantistaj aŭtoritatuloj

Luiza Madrid



De maldekstre: Danilo kaj Adriana Parmegiani, reprezentantoj de LBV ĉe UN; d-ro Humphrey Tonkin, eks prezidanto de UEA; la junulo Felipe Duarte, de LBV; s-ro Neil Blonstein, reprezentanto de la Universala Asocio de Esperanto (UEA) ĉe Unuiĝintaj Nacioj; kaj Eliana Gonçalves, de LBV.

En la reprezenta oficejo ĉe Unuiĝintaj Nacioj, situanta en la sino de Manhattan, Legio de Bona Volo de Usono ĵuse akceptis la noblajn vizitojn de s-ro **Neil Blonstein**, reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj de d-ro **Humphrey Tonkin**, profesoro pri Humanistiko kaj emerita prezidanto de la Universitato de Hartford. D-ro Humphrey estas ankaŭ iama prezidanto de UEA. Kelkjaraj amikoj de LBV, Tonkin kaj Blonstein ricevis la beletran verkon de la verkisto Paiva Netto *Meditadoj el la Animo*, lanĉitan dum la 8a Tutamerika Kongreso de Esperanto, okazinta en la ĉefurbo San-Paŭlo, Brazilo, en la jaro 2011 (vidu paĝon 14).

En la okazo, la vizitantoj konis la ĉefajn agadojn de LBV en Usono, kaj ankaŭ la vastan laboron realigatan de la Instituciо en aliaj ses landoj, kie ĝi havas memstarajn bazojn (Argentino, Bolivio, Brazilo, Paragvajo, Portugalio kaj Urugvajo).

**IOM DA HISTORIO –** La 3an de julio 2010, la direktoro-prezidanto de la Instituciо, José de Paiva Netto, per video-konferenco komandis la inaŭguron de la usona oficejo de LBV, cele al reprezentado ĉe UN. Tiam d-ro Tonkin nepre volis registri siajn gratulvortojn pro la inaŭguro de la novaj instalaĵoj de LBV en la lando: *"Mi forte gratulas vin pro tiu ĉi nova iniciato. Certe ekzistas bonaj eblecoj por kunlaboro inter UEA kaj LBV".*

## Danko al ĉiuj samideanoj



**Pro neebleco aperigi ĉiujn retpoŝtajn mesaĝojn kaj leterojn senditajn al la ĉefgvidanto de LBV kaj al revuo BONA VOLO, ni dankas, per ĉi tiu eldono, kelkajn el ili kiel maniero reprezenti ĉiujn:** **(Albanio)** Bardhyl Selimi; **(Anglio)** Brian Barker, Hussain Al-Amily; **(Argentino)** Francisco Zilli, Jorge Enrique Cabrera, Roberto Sartor, Ruben Diaconu; **(Aŭstralio)** Franciska Toubale, Janusz Wolak; **(Aŭstrio)** Bernhard Tuider; **(Belgio)** Heidi Goes; **(Benino)** Mechak Ezin; **(Bosnio-Hercegovino)** Mićo Vrhovac; **(Brazilo)** Aida Maria Mendes Lima, Anita Becker, Antonio Felix, Carlos Moacir Couto Lima Filho, Emílio Carlos Vaz Cid, Ereni Pereira, Evandro Caboclo, Fabio Santos, Henrique Knoedt, Jair Salles, José Roberto Alves de Albuquerque, Jozefo Leiĉ, Marcia Braga de Oliveira, Neusa Amor, Said Pontes de Albuquerque, Samuel Gomes da Costa, Sebastião Pimentel de Assis, Vicente Paulo Werneck; **(Bulgario)** Antoaneta Nikolaeva, Ivanka, Dimitrinka Kateva, Kanjo Kanev, Serafim Serafimov; **(Ĉeĥio)** Jan Werner, Jarmila Rýznarová, Jaroslav Jarhan, Petro Chrdle; **(Ĉilio)** Ivan Mattig Catalan; **(Ĉinio)** Ding ji, Han Zuwu, Xiao Fujun, Xiong Zhouxuan; **(Finnlando)** Raita Pyhälä; **(Francio)** Daniel Durand; **(Germanio)** Alicja Lewanderska-Quednau, Stanislavo; **(Grekio)** Iosif; **(Hindujo)** Adinarayana Machavarapu, Probal Dasgupta, Ranga; **(Hispanio)** Luis Serrano Pérez; **(Hungario)** Adri Pásztor, Anna Bartek, Eugeniusz Szwarc, Imre Ferenczy, István Gulyás; **(Italio)** Gianfranco Polerani, Luigia Oberrauch Madella, Nicola Morandi, Renato Corsetti, Serio Boschin; **(Japanio)** Haŝiguĉi Ŝigejuki, Hideki Harada, Huang Yinbao; **(Kanado)** Raymond Brisebois; **(Komoraj Insuloj)** Ali Mze Mihidjahi; **(Kongo)** Jean Bosco Malanda, Joel Muhire, Mana Namutema Brinson; **(Kroatio)** Boris Di Costanzo; **(Kubo)** Alfredo Portillo, Eduardo Roberto Sanchez, Manuel Orestes Rodríguez Rábago, Maritza Gutiérrez González; **(Madagaskaro)** Bruno Randrianarivelo; **(Nepalo)** Bharat Ghimire; **(Niĝerio)** Gabrielo O. Oshó-Davies; **(Pakistano)** Adeel Mahmood Butt, Jawaid Eahsan, Muhammad Akram Rongha, Saeed Ahmad Farani; **(Peruo)** Carlos Miranda; **(Pollando)** Andreo Pettyn, Aurelia Sokol, Gerardo Tobias, Przemvslaw Wierzbowski; **(Portugalio)** Manuel José Pinguinha; **(Rumanio)** Attila Makay, Julia Sigmond; **(Rusio)** Vladmir Vasiljevicx; **(Svislando)** Claude Gacond, Hans-W. Grossmann kaj **(Taĝikio)** Saidmurod Hoĝazod.




Fotoj: Priscilla Antunes

# Lernantoj de LBV lernas Esperanton en Rio

En la Eduka Centro de LBV en la urbo Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, la lingvo Esperanto estas unu el la lernobjekto por la infanoj el familio kun malalta mongajno, kiuj estas asistataj de la Institucio. Entuziasmaj, ili strebas lerni, ĉar rekonas la gravecon de la lingvo. La lecionojn gvidas la volonta instruisto de la Institucio, **Elmir dos Santos Lima**.

Por faciligi la lernadon, la lernantoj uzas publikigaĵojn kiel la libro *Meditadoj el la Animo*, de aŭtoreco de la verkisto Paiva Netto, la revuo BONA VOLO, la ekumenaj infankolektoj "Fabloj de la Naturo" kaj "La vivo de Jesuo" de la marko Soldatetoj de Dio, de LBV, tradukitaj al la lingvo. **Natan Gonçalves**, 11-jara, jam dividas la lernitaĵojn kun aliaj lernejanoj: *"Tio estas vere ĝuinda, ĉar mi lernas novan lingvon kaj povas paroli kun aliaj personoj. Mi jam scipovas diri la numeralojn, la alfabeton kaj ni eĉ kunkantas esperante al homoj kiuj vizitas nian lernejon"*, li rakontas.

La instruisto montris sin tre kontenta pri la agado de studentoj: *"Ili estas tre inteligentaj, havas intereson, ni havos grandajn rezultojn kun ĉi tiu klaso"*. Elmir ankaŭ estas infankuracisto kaj kontribuas libervole ekde pluraj jaroj al Legio de Bona Volo en Rio-de-Ĵanejro.



# Sudkorea esperantistino vizitas Legion de Bona Volo

Fotoj: Priscilla Antunes







1) La sudkorea esperantistino Hyon-suk Li kaj la amiko Jair Salles pozas flanke de infanoj el la Ekumena Infana Koruso de Bona Volo. 2) Eveninte en unu el la lernoĉambroj, la geesperantistoj parolis al la lernantoj de LBV. La instruisto Jair Salles kaptis la okazon instrui kelkajn vortojn al la lernantoj en la internacia lingvo.

La Eduka Centro José de Paiva Netto, de Legio de Bona Volo, akceptis la fratan viziton de la sudkorea Esperanto-instruistino **Hyon-suk Li**. En la ĉijara Februaro akompane de la interpretisto kaj konata brazila instruisto **Jair Salles**, la vizitantino propraokule konis la laboron realigatan de la Institucio en la urbo Rio-de-Ĵanejro.

Alvenante al Legio de Bona Volo, Hyon-suk Li estis akceptata de la Ekumena Infana Koruso de Bona Volo, konsistanta el lernantoj de la Eduka Centro. *"Kiam mi vidis la infanojn kantantaj kaj dancantaj, mi havis mirindan impreson"*, komentis la instruistino.

La vizitantino konatiĝis kun Legio de Bona Volo pere de Portalo Bona Volo. *"Mi ne konas la portugalan lingvon kaj pere de Esperanto mi eksciis pri LBV, danke al interreta komunikado. Kiel instruisto mi elektis LBV-lernejon"*, ŝi komentis.

En la Edukejo de LBV, Esperanto estas unu el la elekteblaj lingvoj en la lernoprogramo de la lernantoj. La instruistino vizitis la lernoĉambrojn kaj parolis al kelkaj infanoj en la internacia lingvo. *"Tre trafa estas la ideo de LBV elekti Esperanton kiel unu el siaj lingvoj por komunikado, ĉar temas pri idealoj tre similaj."*

Ĉe la fino de la vizito, Hyon-suk Li gratulis la Institucion pro la socieduka laboro: *"Mi tiel ĉarmiĝis, ke mi ŝatus iam labori ĉi tie. Mi ne forgesos ĉi tiun sperton"*.



# La Federacia Distrikto gastigas la 47an Brazilan Kongreson de Esperanto

Ĉi-jare la Federacia Distrikto, kiu gastigas la ĉefurbon de Brazilo, fariĝis ankaŭ ĉefurbo de Esperantujo. En Januaro samtempe okazis la 47-a Brazila Kongreso de Esperanto, la 32-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso kaj la 10-a Infana Kongreseto de Esperanto. La elektita loko estis Taguatinga, kie kunvenis lernantoj, parolantoj de Esperanto el diversaj partoj de la mondo, reprezentatoj kaj prezidantoj de delegacioj de la Universala E-Asocio.

Dum la malferma solenaĵo de la evento, en la oficiala tabloformiĝo partoprenis la prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (BEL), d-ro **Lício de Almeida Castro**; la prezidanto de Taguatinga Esperanto-Klubo (TEK), sinjoro **Evandro Avellar**; kaj la prezidanto de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO), **Rafael Henrique Zerbetto**.

Krom enlandanoj, partoprenis en la ceremonio ankaŭ alilandanoj el Belgio, Pollando, Portugalio kaj Serbio.

La kontribuo de Legio de Bona Volo por la renkontiĝo estis bonege akceptita. En la dua tago de la kongreso, la legiana junulo **Felipe Duarte**,



Eldonejo Elevação portis la lanĉojn de la speciala eldono de la revuo BONA VOLO *Edukado* kaj de la infanlibro *La Mirakla Fiŝkapto*.





Fotoj: Lucian Fagundes

Ĉeestanta publiko dum la solena malfermo de la 47a Brazila Kongreso de Esperanto.

unu el la reprezentatoj de la Institucio, prelegis pri la temo "Templo de Bona Volo — Domo de ni ĉiuj". Ĉi-okaze li parolis pri la Ekumenismo diskonigita de la plej vizitata monumento de Braziljo, ĉefurbo de Brazilo.

LBV venigis al evento la libron *Meditadoj el la Animo*, de la verkisto Paiva Netto; la revuon BONA VOLO *Edukado*, faldfoliojn pri TBV; la librojn *Furnario, Ruĝa Fiŝeto* kaj *La mallaborema formiko*, de la marko Soldatetoj de Dio, legitaj de infanoj ĉeestantaj en la 10a Infana Kongreseto de Esperanto. Ĉi-okaze LBV ankaŭ aperigis la infanan verkon *La Mirakla Fiŝkapto*.

La diverstema programo de la evento regalis la vizitantojn kaj la esperantistan publikon per prelegoj, kursoj, ekzamenoj kaj aliaj prezentoj. La ĉi-jara ĉeftemo de la kongreso estis "Renoviĝo de la Esperanto-movado: Disvastigado, Edukado kaj Komunikado". Unu el la allogaĵoj de la programo, kadre de la turisma promeno, estis vizito al la Templo de Bona Volo (TBV), unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo tutmonde konata (vidu paĝon 36).

## 70-jariĝon de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro



Arkivo BV

Ĉijare en Marto, la Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro (AERĴ) memorfestis sep jardekojn da ekzistado. La aranĝo kunvenigis reprezentantojn el la tuta brazila subŝtato Rio-de-Ĵanejro. Legio de Bona Volo estis invitita al la evento. La solena podio, konsistanta el diversaj reprezentantoj de la esperanta komunumo, kalkulis ankaŭ je la reprezentanto de la Institucio en la evento, Felipe Duarte, plenuma sekretario de la Departemento pri Esperanto de LBV.



# Tutamerika Kongreso de Esperanto en San-Paŭlo

La urbo San-Paŭlo, Brazilo, okazigis, en Julio 2011, la 8-an Tutamerikan Kongreson de Esperanto, la 46-an Brazilan Kongreson de Esperanto kaj la 31-an Brazilan Esperantistan Junularan Kongreson, realigatajn en la sidejo de Faculdade Santa Marcelina (FASM). Ĉi-okaze la evento temis pri *"Procezoj de regiona integriĝo en la amerika kontinento: la rolo de Esperanto"*.

La malferma solena kalkulis la prezenton de la Orkestro de Militista Policio de San-Paŭlo, kiu ludis la Brazilan Nacian Himnon, kaj sekve la Himno de Esperanto *La Espero*, kaj ĉeeston de esperantistoj el pluraj regionoj de la mondo. Tuj poste ĉiuj aŭdis prelegon de la brazila studento pri Internaciaj Rilatoj **Kalyana Oriano**, kiu nuntempe loĝas en Italio. Ŝi prezentis sian projekton pri starigo de Esperanto ĉe rilatoj kaj negocado inter landoj.

Refoje prestiĝigante la eventon, Legio de Bona Volo kundividis kun la ĉeestantoj siajn diversajn publikigaĵojn, kiuj reliefigas la agadojn de la Institucio samkiel la rekonon kaj valorigadon de LBV al la internacia lingvo. Oni elstarigas la lanĉon de la libro *Meditadoj el la Animo,* kies aŭtoro estas la verkisto Paiva Netto. Tradukis ĉi tiun verkon la renoma Esperanto-tradukisto kaj –verkisto d-ro **Paulo Sergio Viana**. Al la Super Reto Bona Volo pri Komunikado la tradukisto diris, okaze de la evento: *"Mi havas grandan honoron, ke oni invitis min traduki la verkon de Paiva Netto.*








(1) Ĉeestantoj el la tuta mondo partoprenas en la Kongreso de Esperanto en San-Paŭlo, Brazilo. (2) Kelkaj infanoj asistataj de LBV en San-Paŭlo foliumas la infanlibreton *Feliĉpromesoj de la Prediko de Jesuo sur la Monto*. (3) Paulo Sergio Viana, tradukisto de la libro *Meditadoj el la Animo* al Esperanto, parolas okaze de prelego fare de Legio de Bona Volo, enkadre de la oficiala kongresa programo. (4) Junulo atente legas la unuajn paĝojn de la libro *Meditadoj el la Animo*, de la verkisto Paiva Netto. (5) Solena malfermo de la 8a Tutamerika Kongreso de Esperanto.

*Ĝi estas belega eldono, kiu enhavas altvalorajn ideojn. Sekve, mi estas tre kontenta pro tiu laboro, tre kontenta pro la enhavo de tiu verko".*

La ĉeestanta publiko ankaŭ povis vidi la publikigaĵojn: *Feliĉpromesoj de la Prediko de Jesuo sur la Monto*, el la kolekto "La vivo de Jesuo"; la revuo BONA VOLO, numero 68, speciale preparita por la Kongreso; kaj ankaŭ estis prezentita al la partoprenantoj faldfoliojn pri la Templo de Bona Volo.

Laŭ sinjoro **Alberto Fernández-Calienes Barrios**, la Tutamerika Kongreso de Esperanto okazis en Brazilo ĉar *"estas en Brazilo, kiu troviĝas la plej granda E-movado de la regiono. Se Brazilo alvokas, ĉiuj ĉeestas. (...) Ĉi tiu movado ebligis bonkvalitan rapidŝanĝon de ĉiuj aliaj E-movadoj en la kontinento".*


Inter la diversaj programeroj kiuj enkadris prelegojn, kursojn, aplikon de ekzamenoj kaj kultur-prezentadon, LBV gvidis aktivecon en specialan spacon por infanoj. Je la 11-a, kelkaj infanoj asistataj de la Institucio vizitis la kongresejon, dum kiam la legiana skipo rakontis per lerta maniero, iomete da historio pri Esperanto, instruante kelkajn vortojn de la plej parolata planlingvo en la tuta mondo. Sekve oni legis, unue en esperanto kaj poste en la portugala, la libron *Feliĉpromesoj de la Prediko de Jesuo sur la Monto*.

Je la 13-a, la kongresanoj aŭdis prelegon de la junulo Felipe Duarte. Li reliefigis la sukcesa historio pri la Institucio kaj la zamenhofa lingvo.

# Plivastigita — publiko —

## Furoraĵo de la verkisto Paiva Netto ĝuas konatecon ĉe esperantistoj

Post la sukceso en Brazilo kaj en Portugalio, la libro *Reflexões da Alma*, de la verkisto Paiva Netto, nun atingas la esperantan publikon. Tradukita al la lingvo internacia Esperanto per la titolo *Meditadoj el la Animo*, la verko estas bone akceptita en pluraj landoj. La teksto-kvalito de tiu brazila aŭtoro, kun pli ol 4,7 milionoj da libroj venditaj, pravigas tian eĥon. El Bulgario, lando en la eŭropa sudoriento, la poetino **Lilia Koleva Nikolova**, kunlaboranto de la revuo *Bulgara Esperantisto*, en la urbo Razgrad, pretigis recenzon pri la nova versio de la furora libro de Paiva Netto.




Per la artikolo titolita "Lernolibro pri Sava Amo", Lilia komentas: *"La belaspekta libro fascinis min kaj mi karese tuŝis ĝin ŝajne juvelan relikvon. Mi hastis eklegi antaŭsentante enhavon despli alloga"*.

Laŭ sia analizo, la poetino komparas: "*Simile al ravaj perloj en koliero, la verko kolektas lumigan diversepokan kaj tutmondan saĝecon de famaj geniuloj, lasintajn kreajn kaj glorajn spurojn en la historio de la homa progreso.*" Laŭ Lilia, ĉiun instruan citaĵon akompanas konciza kaj kontentige informdona biografio de la koncerna aŭtoro. Tial *Meditadoj el la Animo* akiras enciklopedian dimension.


Persona arkivo

Lilia Koleva Nikolova

La brazila kaj la portugalia eldonmerkado kune respondas por pli ol 400 mil ekzempleroj venditaj de la libro *Reflexões da Alma* [Meditadoj el la Animo]. Krome, la verko furoris en gravaj beletraj eventoj, enlande kaj alilande, kiel en la 80a Librofoiro de la urbo Porto (Portugalio), en la jaro 2010. Per tio, ĝi allogas legantojn en Eŭropo ekde la lanĉo de la speciala eldono, en 2008, pere de la eldonejo Pergaminho. La esperanta versio de la verko estis lanĉita en julio 2011, okaze de la 8a Tutamerika Kongreso de Esperanto, okazinta en la ĉefurbo San-Paŭlo, en Brazilo.

En la recenzo, ŝi listigas la edukajn aspektojn kaj la Kulturon de Paco ĉeestantajn en la verko. *"Jen kuraĝiga instrulibro, kiun oni konstante relegu por ĉerpi optimismon. En ĝi regas tia ĉarma etoso, kian mi sopiras: Paco, Frateco, Solidareco kaj Karitato.* Meditadoj el la Animo *de Paiva Netto meditigos la homojn (...), kiuj nepre estiĝos pli fortaj, batalemaj, sukcestrafaj, kredantaj aŭ almenaŭ espergardaj, ke la hinda simbolo de la neperforta filozofio* ***Mahatma Gandhi*** *profete pravas: 'Kiam unu homo atingas plenecon de Amo, tiam li neŭtraligas malamon de milionoj'".*

La recenzistino reliefigas: "*La legantoj trovos absolute proprajn kaŭzojn por danki al Paiva Netto. Malsamaj sugestoj kondukas al komuna impreso pri utila kaj necesa libro kun digna misio de ŝatata Lernilo*".

## Modela Esperanto

La traduko farita de d-ro Paulo Sergio Viana meritis specialan atenton de la artikolistino. Danke al tiu laboro, ŝi skribis, *"mi ĝuas la libron, kies ĉiurilata bonkvalito devas fierigi Esperantion"*. Laŭ la poetino, *"la brila kaj impona Esperanto"* pravigis la bonan enhavon kaj grafikaspekton de la verko. *"Mi miras kaj admiras, ĉar temas pri traduko. Do, plej konvenas por esperantigo la perfekta ĝis facila kaj agrabla percepto. Pro katenoj kaj influo de nacia lingvo foje tradukitaĵo apenaŭ kompreneblas. En tiu ĉi okazo, per sperto kaj talento, rezultis idiomo pli proksima ol la gepatra."*

Pri la multaj agadoj plenumitaj de la verkisto Paiva Netto, kiu ankaŭ estas ĵurnalisto, radipreleganto, edukanto, komponisto, filozofo kaj poeto, la aŭtorino de la recenzo reliefigas la rolon de la direktoro-prezidanto de LBV, pro lia graveco por la esperanta movado. *"Fondita je la 1-an de Januaro 1950. Bonfara, filantropia, eduka, klereca, filozofia, ekumena kaj altruista, senprofitcela Institucio kun internacia prestiĝo kaj kunlaborado por protektata vivo de popoloj en situacio de damaĝeblecon aŭ socia risko"*, ŝi reliefigas.



Raita Pyhälä

## Kulturo kaj saĝeco

Per tiuj vortoj, kiu titolas ŝian beletran recenzon, la magistro **Raita Pyhälä**, el Finnlando, skandinava lando, resumis la verkon de la Ĉefgvidanto de LBV. Sendita al diversaj esperantaj komunikiloj, en kiuj ŝi kunlaboras, la artikolo reliefigas: "*Kiam oni eklegas la libron, oni kvazaŭ komencas diskuti kun la aŭtoro. Pripensante liajn aforismojn kaj citaĵojn el la spirita, religia, filozofia, arta heredaĵoj de la Homaro, oni komencas pesadi siajn proprajn opiniojn kaj fidon — aŭ mankon de fido. Meditante li meditigas la leganton pri Ekumenismo, Paco, Amo, Edukado, la sorto de la homo kaj mondo*".

Laŭ la edukistino, kio ebligas la estigon de tiu dialogo kun la leganto, tio estas la sperto de la aŭtoro. "*Ekde sia junaĝo li okupiĝas pri tiuj temoj sed ankaŭ pri politiko, ekonomiko kaj helpado al malhavuloj. Lia klero baziĝas sur longa vivo (sepdeko da jaroj) kaj sur impona legiteco. Imponaj estas ankaŭ liaj meritoj en la publika vivo de Brazilo, en muziko, poezio, radio kaj aliaj amaskomunikiloj, ne paroli pri lia agado en la Legio de Bona Volo*".

Ankoraŭ pri la verko, ŝi diras: "*Paiva Netto montras konvinkiĝon, ke 'la homo ne estas nur sekso kaj stomako kaj ke en ni staras Eterna Spirito'. Ĉio devenas el Spirito. Idealisto li estas, sed kun kompetenco kaj talento. Li montras ankaŭ sian verkistan stilon kaj sian guston pri pentroarto. En la libro videblas verkoj de famaj pentristoj, kiaj* ***Cezanne***, ***Jan van Eyck***, ***Vincent van Gogh***, ***Gainsborough***, ***Kokochka***, ***Seurat***, ***Signac***, ***Vermeer****"*.

En la recenzo, la magistro substrekas kelkajn frazojn de la aŭtoro, kun kiuj ŝi identiĝas: "*Unu*

> "Meditadoj el la Animo: Jen kuraĝiga instrulibro, kiun oni konstante relegu por ĉerpi optimismon. En ĝi regas tia ĉarma etoso, kiam mi sopiras: Paco, Frateco, Solidareco kaj Karitato."

*el la danĝeroj, kiujn la Homaro trapasas, estas vulgarigo de sufero"* kaj "*Solidareco estu lumo, kiu malfermas novajn vojojn inter la ombroj de avido"*. Ŝi ankaŭ rimarkigas ke la antaŭparolon de la libro subskribas la pola ĵurnalisto, dokumentfilmisto kaj esperantisto **Roman Dobrzyński**, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (1989-1992). Fine, la emerita lingvoinstruistino Raita Pyhälä taksas aliajn informojn de la libro: "*La listo de fontolibroj enhavas kvardekon da titoloj, kaj laŭlonge de la paĝoj estas citataj pli ol 180 pensuloj, filozofoj, religiuloj kaj verkistoj. Sur paĝo 11 legeblas nur unu frazo: 'Ĉio forpasas, nur Jesuo restas!' Sur la finaj paĝoj oni trovas* Patro-Nian *kaj citaĵojn el la* Prediko de Jesuo sur la Monto".



Persona arkivo
Raymond Brisebois

Per la titolo *"All you need is Love"* (Amo estas ĉio kion vi bezonas), la kanada esperantisto **Raymond Brisebois**, vicprezidanto de la Kanada Esperanto-Asocio, redaktanto de la informilo *Hilelismo* kaj kunordiganto de la Hilelista Esperanto-Komunumo, ankaŭ skribis pri la verko *Meditadoj el la Animo*. Sekve ni transskribas kelkajn elprenaĵojn: "*El la skribaĵoj kaj voĉoj de plurdekoj da kulturoj, popoloj kaj lingvoj, la aŭtoro José de Paiva Netto prezentas kaj komentas la vastkomune esprimitan principon inspiran kaj progresigan de nia mondo: tio estas, ke Amo ankoraŭ plej efike provizos la vojon al Bono kaj al vastiĝanta pliboniĝo ĉiutavole kaj ĉiuserve je socio, ke la ekvilibro inter la bezonoj, la rajtoj kaj la respondecaĵoj de la individuo kaj de la individuaro troviĝas per tiuj mesaĝoj kaj ideoj. Granda plejparto da meditadaĵoj de la aŭtoro estas unu-paĝaj pensjuveloj aparte kontribuantaj al la baza principo de la librotemo. Tiel prezentata, la meditaĵoj facile digestumiĝas de la menso kaj la animo de la legantoj.* (...)

*"La nocioj pri interrespektado kaj interkunveniĝado — por ne plu nur priparoli, sed vere agi por atingi la komune deziratan bazan socion bonan kaj ĉe ni mem kaj ĉe niaj najbaroj proksimaj kaj trans la planedo — estas programataj tra la libro, kaj ĉiuj celas 'la konkretigo(n) de spirito de konkordo, kiu vere transformu individuon de interne eksteren, kion oni ne atingas per leĝa dekreto'. (paĝo 65)"*.

> Kiam oni eklegas la libron, oni kvazaŭ komencas diskuti kun la aŭtoro. Pripensante liajn aforismojn kaj citaĵojn el la spirita, religia, filozofia, arta heredaĵoj de la Homaro, oni komencas pesadi siajn proprajn opiniojn.

Ankaŭ komentis la argentina profesoro **Roberto Sartor**, en la blogo *Mendoza Esperanto-Rondo: "Sendube tiu nova libro de Paiva Netto povas esti rigardata kiel inspira manlibro por la agado de volontula socia laboro. Ĉar la laboron oni ne plenumas monserve, sed pro amo, ĝi entenas klaran spiritan dimension de ekspansia energio. Kaj cele plifortigi tiun bazan pricipon de persona 'bona volo', sur kiu baziĝas la libro, la verko sin turnas al Esperantujo.*


Persona arkivo
Roberto Sartor

*"La varieco de la pritraktitaj temoj kaj la amplekso de la komentitaj eldiroj de filozofoj, profesoroj kaj elstaraj humanistoj — multaj el ili brazilanoj — igas tiun libron malgranda spiritualisma kaj ekumena enciklopedio kun alloga kaj utila legado."*

Pri la rilato de la beletra verko kun la esperanta publiko, profesoro Sartor konkludas: "*La libro estas bone akceptita de tiuj kiuj uzas Esperanton kiel lingvon internacie alternativan kaj ĝin diskonigas. La libro prezentas 'ekumenajn' nuancojn kaj ĝeneralajn aludojn pri la originala 'interna ideo' de Esperanto, por aliiĝi al servo favore al la Homaro, cele havigi plibonan kompreniĝon kaj kunagan Solidarecon, respekte al la multaj kulturoj kaj biodiverseco, bazo de paca kunvivado sur la planedo Tero"*.

**PORTALO BONA VOLO**

Aliru al www.bonavolo.com kaj legu aliajn opiniojn de Esperantistoj pri la verko. Tie Vi ankaŭ trovos informojn pri kiel aĉeti ĝin.

# Lingvoj kaj UN

## Legio de Bona Volo prelegas en simpozio ĉe Unuiĝintaj Nacioj



Fotoj: Arkivo BV

Supre, LBV prezentas videon pri sia komunika laboro. Dum la prelego, oni reliefigis ankaŭ la lecionojn de Esperanto, gvidatajn en la Eduka Centro LBV, de la Institucio, en la subŝtata ĉefurbo Rio-de-Ĵanejro. Sube, Legio de Bona Volo prelegas en simpozio ĉe Unuiĝintaj Nacioj. En la okazo, elstaraj fakaj gastoj, venintaj el pluraj landoj, kunsidis por diskuti pri la graveco de lingvoj en la laboroj disvolvataj de UN kaj kiel la lingvaj temoj helpas al la evoluigo de societoj.



La Universala Esperanto-Asocio (UEA) organizis simpozion en Unuiĝintaj Nacioj pri la temo “Lingvoj kaj UN”. En la okazo, distingitaj gastoj kaj fakuloj pri la temo, venintaj el pluraj landoj, kunsidis por pridiskuti la gravecon de lingvoj en la laboroj disvolvataj de Unuiĝintaj Nacioj kaj kiel lingvaj temoj helpas al la evoluigo de homaj socioj.

Tiu internacia Organizaĵo ĉiutage uzas tradukadon kaj interpretadon en siaj aktivadoj por diskonigi informojn al siaj ŝtatoj-membroj kaj al la ĝenerala publiko. UNESKO (Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo), ekzemple, dediĉas sin al konservado de lingva diverseco.

Per invito de la simpozia prezidanto, d-ro Humphrey Tonkin, universitata profesoro pri Humanistiko kaj emerita prezidanto de la Universitato de Hartford, Legio de Bona Volo prezentis al la publiko sian sperton pri internacia komunikado. Ĉiam konscia pri la kultura diverseco de la popoloj, en la plej diversaj lingvoj, de pli ol ses jardekoj la Institucio diskonigas al la mondo sian sociedukan laboron, fundamentitan sur la ekumena idearo de la Bona Volo cele al konstruo de ia Kulturo de Paco.

D-ro Humphrey Tonkin tiel sin esprimis pri la prelego de la Institucio en la evento: *“Mi tre dankas al LBV pro la grava kontribuo igi tiun tagon sukcesa. La prezentado helpis elstarigi la kontribuon de Esperanto por la temo (...). Resume, la kontribuo de LBV estis perfekta”.*

Vizitu la Oficejon de Reprezento de Legio de Bona Volo por la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko, situantan ĉe 36W 44th Mezzanine Street. Pliajn informojn per la telefono (1646) 398-7128 aŭ per la retejo www.legionofgoodwill.org.

# Esperanto:
## *125-jarojn vivanta kaj kreskanta!*

**Paulo Sergio Viana**



Ŝajnas, ke multaj homoj tra nia vasta mondo ankoraŭ ne klare perceptis, sed de 125 jaroj okazas sur la planedo Tero absolute unika fenomeno. Je la unua fojo, jarmilojn post la natura formiĝo de amaso da homaj lingvoj, artefarita internacia lingvo, kontraŭ ĉiaj prognozoj de lingvosciencistoj — fariĝis vivanta, efektive funkcianta! Temas ja pri eksterordinara fenomeno! Dum longega tempo la homaro sentis, ke necesas komuna lingvo por ĉiuj, sed la uzado de lingvo de reganta popolo, laŭ ties ekonomia aŭ militista potenco, pli aŭ malpli frue fiaskis, pro evidentaj kialoj. La mito pri Babelo aspektis efektive kiel kondamno. Necesis neŭtrala, arta, facila lingvo, taŭga por ĉiuj, kaj dum jarcentoj oni senrezulte serĉadis tian "perfektan lingvon". Nun ĝi okazas, kaj ni, privilegiuloj el la 20-a jarcento, povas konstati la "miraklon". Pro la noveco de tiu fakto, multaj homoj ankoraŭ ne atentas pri ĝi, kaj ankoraŭ kelkaj aliaj antaŭjuĝe skeptikas, en plena 21-a jarcento.

Sed la nekontraŭstarebla fakto estas, ke Esperanto atingas sian 125-jariĝon en plena forto, uzata en la kvin kontinentoj, de miloj da adeptoj. Ne plu eblas dubi, ke ĝi perfekte funkcias: en literaturo, arto, scienco, filozofio, ĵurnalismo, kongresoj, lokaj asocioj kaj kluboj, per ĉiaspecaj amaskomunikiloj — kaj eĉ en la sino de familioj.

Kio do okazis? Kial Esperanto sukcesis? Multaj kapablaj kaj inteligentaj homoj antaŭe klopodis atingi tian heroaĵon, do kial nur Esperanto sukcesis atingi la staton de vera, vivanta, internacia lingvo? La fenomeno estas multfaceta kaj multkiala, kaj certe malsimplaj elementoj rolis kiel decidaj. Eble oni neniam perfekte komprenos la reton de sociaj okazaĵoj, kiuj kaŭzis la sukceson de Esperanto. Pro tio, multaj Esperantistoj sincere nutras en siaj spiritoj la ideon, ke temas pri Dia interveno. Pri Dia interveno ni ne kompetentas. Tre modeste, ni penu kompreni almenaŭ kelkajn pure homajn faktorojn.


Oni povus por tio elekti diversajn kriteriojn, diversajn studmetodojn. Ni elektis plej simplan: ni pinĉis el la 125 jaroj de Esperantovivo dek gravajn momentojn, kiuj niaopinie decide influis por la sukceso. La elekto estas tute persona, oni povus elekti pliajn dek aŭ dudek; oni povus ilin fortranĉi al nur kvin – aŭ tri. Volonte ni akceptus, ke aliaj homoj publikigu siajn elektojn kaj analizojn por kontribuo al la kompreno. Finfine, temas pri nia kulturlingvo!

**Rimarkigo de la eldonistoj:** Ni aperigas en ĉi tiu eldonnumero la unuan parton de la artikolo, kiu prezentas kvin el tiuj grandaj momentoj por la monda E-movado. Ni invitas vin legi la duan parton en la Portalo Bona Volo. Vidu instrukciojn ĉe la fino de ĉi tiu sekcio.

# DEK GRAVAJ MOMENTOJ EN LA HISTORIO DE ESPERANTO

## 1. LA UNUA LIBRO

Sendube, unu decida punkto estis la personeco de la kreinto de la lingvo. **Zamenhof** estis absolute eksterordinara homo kaj lasis en la lingvo kaj en la movado sian markon. Li sukcesis miksi en sia memo mirindan idealismon (kontraŭ ĉia prognozo de prudenta analizo), sencon pri praktiko (kiel unua movadestro), kaj neelĉerpeblan obstinon kaj laborkapablon (nur pensu pri la kvanto da leteroj kaj tradukoj, kiujn li verkis). Krome, li estis neskueble pacema kaj tolerema — sen forlaso de siaj esencaj




La *Unua Libro* por rusoj — rusa eldono, 1887.

vidpunktoj. Ni konsentu: tian homon oni ne tre ofte trovas. Tiu homo produktis per sia persona penado tre modestan broŝureton — la Unuan Libron —, kaj ekestis la historio de Esperanto. Unu eta broŝureto, private farita, sen subteno de ia ajn prestiĝa institucio aŭ aŭtoritatulo! Kiu sukcesus ripeti tian heroaĵon nun, en tempo de facila komunikado per interreto? Per formika strategio li kontaktis ĝustajn homojn, kaj tio estas leciono ankoraŭ valida: la Esperantomovado ankoraŭ bezonas "ĝustajn homojn" por kondukado de tiuj 125 jaroj al 1250 jaroj, aŭ pli. Esperanto estas maldiskriminacia, sendube, ĝi celas ĉiun homon; sed ĝia kondukado ankoraŭ dependas de kompetentaj gvidantoj.

## 2. LITERATURO

Esperanto estas ne nur la unua arta lingvo, kiu sukcesis. Ĝi estas la unua arta lingvo, kiu produktis grandan literaturon. Oni povas konsideri, ke tiu estis unu el la plej akraj perceptoj de Zamenhof: lingvo ne povus ekzisti nur por gajni monon, faciligi komercon, peri internaciajn politikajn diskutojn aŭ turismi. Vivanta lingvo estas afero de la homa spirito, ĝi devas esti perilo de la menso kaj de la pensoj homaj — la komplikaj, subtilaj homaj pensoj. Se ĝi ne funkcius en tia interna, profunda nivelo, tiam ĝi nepre ne funkcius ankaŭ rilate la vulgarajn, banalajn ĉiutagaĵojn. Kaj tian rolon plenumas nur literaturo. Pro tio ĉiu popolo kreas sian literaturon — por konservi sian unuecon, sian distingeblecon. Zamenhof tiel klare komprenis tion, ke jam okaze de la lanĉo de sia *Unua Libro* li verkis la unuan poemon, "Ho mia kor'". Kaj li ne plu haltis, dumvive. Li verkadis senĉese, li komprenis, ke ĉiu paĝo lia estas iom pli da ligno en la brulejon de lokomotivo. Komence nur li, sed baldaŭ aliaj klarvidaj homoj aliĝis al tia lingvonutrado.

Zamenhof verkis multajn leterojn, paroladojn, eseojn, kiuj blovis en la lingvon spiriton. Ili estas gravegaj. Sed lia traduklaboro estis la plej eksterordinara, ne nur pro la elvolvado de lingvaj rimedoj kaj uzoj, sed precipe pro la saĝaj elektoj. El miloj da ĉefverkoj de la universala literaturstoko, li kaptis tre oportunajn: la Biblio, Hamleto, Fabeloj de Andersen, La Batalo de l' Vivo, la Proverbaron. Kaj aliajn. Per tio la lingvo kaj la movado ekpaŝis kaj ne plu haltis. Kiu aŭtoro de alia arta lingvo agis kiel Zamenhof? La instruo restas valida ĝis hodiaŭ. En tempo, kiam homoj ne tre emas legi altan literaturon, necesas plu admoni: se iu popolo ne vartus sian literaturon, ĝia lingvo iam malaperus — kaj kune malaperus la popolo mem.

## 3. KONGRESOJ

En nia moderna tempo, kiam interkomunikado kaj vojaĝoj fariĝis preskaŭ banalaj, estas nefacile ĝuste taksi la gravecon de la Esperantistaj kongresoj por la sukceso de la lingvo. Kompreneble, aliaj iniciatintoj de artaj lingvoj alvokis al siaj kongresoj, sed ili estis preskaŭ nur pure teknikaj kunsidoj de fakuloj. Ne tiel okazis ĉe Esperantistoj. De la unua el ili,















la fama Bulonja kongreso en 1905, fervoro kaj entuziasmo de formiĝanta popolo ekregis. Ni povus firme aserti, ke sen tia idealismo, filozofio, utopio, revo — nomu ĝin kiel ajn — la Esperanta afero ne prosperus. Homoj aliĝis al ĝi precize pro tio, ke ne temas simple pri lingvo, sed pri iaspeca, religieca kredaro, por kiu valorus la penon sin doni. La kongresoj taŭgis do kiel perfekta kaldrono por varma kuirado de tiu idealisma nutraĵo: ĝis nun la Universalaj Kongresoj ankoraŭ retenas tiun magian etoson de kunfratiĝo kaj amikiĝo. Kiu alia lingvo havas himnon? Kiu alia lingvo adoras sian kreinton preskaŭ kiel sanktulon? Kaj la fenomeno ne okazas nur internacie. En ĉiuj landaj kongresoj, regionaj renkontiĝoj, festivaloj, junularaj eventoj, tendumadoj, grupaj ekskursoj kaj lokaj semajnfinaj kunvenoj staras la flago kun la verda stelo... Feliĉe, Esperanto aperis antaŭ la epoko de interreto, ĉar neniu komputila ekrano povus anstataŭigi la varmon de manpremoj kaj ĉirkaŭbrakoj.

## 4. SENPERSONIGO

Zamenhof estis tiel sagaca konanto de la homa animo kaj de socia funkciado, kaj posedis tian kapablon konkeri la homojn per sia simpatio kaj korpureco, ke li povis en decida momento fari paŝon eble riskan, tamen definitivan por la sukceso de



Ludoviko Lazaro Zamenhof

sia entrepreno: li forlasis la estradon super la lingvo kaj super la Esperantista movado. Kaj ni atentu, ke tio okazis en

tempo, kiam la movado tute ne staris ekster danĝero. Per tio li esprimis sian neskueblan fidon pri sia propra idearo kaj pri la kapablo de la Esperantista popoleto. Tio transdonis al la homoj la respondecon. De nun, ĉiu Esperantisto sin sentis certagrade posedanto de la lingvo kaj idearo, sen superregado de ia ajn aŭtoritatulo. Tio donis al la homoj grandegan antaŭenpuŝon. Kompreneble, dekomence ekzistis Lingva Komitato, poste Akademio de Esperanto, sed la psikologia efiko plu daŭras: kvankam tre gravaj, tiuj institucioj ne havas leĝdonan povon, apenaŭ rekomendan. La popolo efektive posedas la lingvon. Tion pruvas la fakto, ke ne malofte la popolo uzas la lingvon iom preter akademiaj rekomendoj... Zamenhof plene trafis sian celon, senpersonigante ĝin. Vivanta lingvo ne povas estis persona propraĵo. Kaj, kompreneble, la morala prestiĝo de la "Majstro" plu kaj pli kreskis.

## 5. UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Tiu ĉi pompa, pretenda nomo tamen okupas relative modestan domon en Roterdamo [Nederlando]. Sed ĝia signifo en la historio de Esperanto estas netroigebla. Certe, Esperanto ne postvivus sen ĝi. Kreita denove sub idealisma impulso de junulo Hector Hodler, en 1908, ĝi sekvis labormanieron iom similan al la Zamenhofa mem. Jardeko post jardeko la konkeroj amasiĝis. Sufiĉus la senĉesa realigado de Universalaj Kongresoj kaj publikigado de la plej disvastigata revuo en nia lingvo (revuo "Esperanto", nuntempe legata en pli ol 100 landoj) por loki UEA-n sur podion de ĉampiono. Danke al ĝi UNESKO deklaraciis favore al nia lingvo, danke al ĝi publikiĝis serio da verkoj 'Oriento-Okcidento'. Ĝi ĉiam funkcias per modele demokratia sistemo de komitatanoj el diversaj landoj. En ĝi elstaris eminentaj intelektuloj, kiuj lasis literaturan kaj kulturajn kontribuojn kaj firmigis la respekton al Esperanto tra la mondo. Ni menciu nur du el ili: Ivo Lapenna kaj Humphrey Tonkin. Sed ripetiĝas la saĝa formulo: neniu "posedas" UEA-n, krom ties propraj anoj (…).


Hector Hodler

Por legi la kompletan artikolon elŝutu la QR-kodon en vian plurfunkcian telefonon, fotu la kodon. Aŭ vizitu ankaŭ la Portalon www.bonavolo.com.

## LBV kaj Esperanto

Legio de Bona Volo (LBV), ekde sia apero, prestiĝigas Esperanton tiel plenumante unu el la gvidlinioj de la Institucio, nome *"Batali por la plej granda disvastigado de la internacia lingvo Esperanto, altvalora ilo por la interfratiĝo de la popoloj, laŭ la konsidero, ke LBV estas la Esperanto de la religioj, same kiel Esperanto estas la LBV de la lingvoj".*

Kreita en la unuaj tempoj de Legio de Bona Volo, la Departemento pri Esperanto havas kiel celon diskonigi Senlime Ekumenan mesaĝon de la Institucio tra la tuta terglobo, per uzado de la lingvo internacia kiel pova unuigilo. De tiam pliaj publikigaĵoj estis tradukitaj al Esperanto, ekzemple ekumenaj preĝoj, poemoj, rakontoj, bibliaj tekstoj, revuoj, faldfolioj, ĵurnaloj, informfolioj, infanaj libroj i.a.. Elstariĝas ankaŭ la kreo de la Portalo Bona Volo, ofte aktualigita per riĉenhavo kun la distinga perspektivo de la Ekumena Spiritualeco; kun ĝisdatigoj de la tutmonda, Esperanto-movado kaj multo pli.

Aliru al: www.bonavolo.com




Ni atendas Vin! Trovu nian paĝaron en la sociaj retoj.
Se Vi ankaŭ volas ricevi niajn bultenojn,
skribu al esperanto@bonavolo.com.

www.facebook.com/BonaVolo

www.twitter.com/BonaVolo

www.youtube.com/PortaloBonaVolo

BONA VOLO.com

# Ensocietiĝo pere de bonkvalita instruado

"la rigardo trans la intelekto", kiel preskribas la ĉefgvidanto de LBV.

João Periotto



Suelí Periotto*[1], superrigardantino de la Pedagogio de Bona Volo (Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de la Ekumena Civitano), direktorino de la Instituto pri Edukado de LBV.

Legio de Bona Volo ĉiam zorgis diskonigi Edukadon kiu ***nutras Cerbon kaj Koron***, kiel difinas la kreinto de la pedagogia propono de LBV, la edukanto Paiva Netto. Per la Pedagogio de Amo (celanta infanojn ĝis 10 jaroj) kaj la Pedagogio de la Ekumena Civitano (celanta individuojn pli aĝajn ol 11 jaroj), li montras ke la eblecoj por evoluo de la edukato estiĝas ankaŭ ***el interne eksteren***. Alidirate, ĉiu persono havas iajn kulturajn akiritaĵojn, kio distingas pli rimarkinde liajn lertecojn kaj kapablecojn.

Rilate la Pedagogion de LBV, la peranta aktivado de la edukisto, interage kun la lernantoj ĉe la plivastigo de klereco, estas fundamenta por la lernado de *ambaŭ*; kiel kunaŭtoroj, ili dividas inter si sciojn, distinge agante laŭ interaga procedo.

Per tiu eduka praktiko Paiva Netto montras la vojon de la Ekumena Spiritualeco, kies rolo estas venigi pli da lumo sur la aspektojn kulturajn, sociajn kaj intelektajn de la sciaro. Por ebligi la ***solidaran konon*** — entuto de la kona potencialo kun etikaj, ekumenaj kaj spiritaj valoroj — la Pedagogio de LBV konsideras la Homon laŭ ties pleneco, **spirito-biopsikosocia** Estulo. (Komprenu kiel ĉi tiuj aspektoj estas pritraktaj en la tabelo sur la paĝoj 28 kaj 29.)

## Propra metodologio

Konsidere al tiu kompleta Estulo, Legio de Bona Volo kreis propran metodologion por sia eduka sistemo: Lernmetodo per Esploro Racia, Emocia kaj Intuicia (MAPREI), kun speciala atento al **esploro** kaj **intuicio**. La metodo konsistas el ses etapoj, en kiuj la lernanto estas la protagonisto de la eduka scenejo, kaj havas la edukiston

*[1] Suelí Periotto estas pedagogiistino postdiplomita pri Lerneja Administrado kaj Metodologio de la Humanaj Sciencoj kaj magistriĝanta pri Edukado ĉe PUC-SP, konferencisto kaj prezentistino de la programo *Edukado sub Debato*, de Superreto Bona Volo de Radio (sekvu la programon per la Portalo www.bonavolo.com).




**Parta vidaĵo de Supervartejo Jesuo; flanke situas la Instituto pri Edukado José de Paiva Netto. La du konstruaĵoj konsistigas la Edukan Ensemblon de LBV, en la subŝtata ĉefurbo San-Paŭlo, kiu ĉiutage gastigas 1.200 lernantojn, de bebovartejo ĝis mezgrada lernejo, kun bonkvaliteco. Sur la fasado de la Supervartejo, legeblas la penso de la karmemora fondinto de la Institucio, Alziro Zarur (1914-1979): *"La filoj estas filoj de ĉiuj patrinoj, kaj la patrinoj estas patrinoj de ĉiuj filoj".***

André Fernandes

## KIO ESTAS SPIRITO-BIOPSIKOSOCIA ESTULO?

En la sociedukaj centroj de LBV la lernanto estas konsiderata spirito-biopsikosocia Estulo, ĉar li portas kun si la registron de travivaĵoj, kiuj kontribuos al lia lernado.




### "Spirito"

La Pedagogio de Bona Volo valorigas tion kio estas en la interno, la aspektojn de la subjektiveco, kiuj entenas la registron de antaŭaj travivaĵoj; finfine, la edukato ne estas ia *glatigita tabulo*"[*2]. Ĝi ankaŭ stimulas la sentojn kaj plifirmigas valorojn kiel Ekumena Solidareco, Amikeco kaj Partnereco, empatie uzataj.

### "Psiko"

La **emociaj** problemoj estas rigardataj de la multfaka teamo de la edukaj fakoj de LBV, speciale de psikologiistoj. Kiam necese, la edukato estas protektata koncerne la aspektojn de sendefendeco estigitajn de ruinigaj situacioj, ordinaraj en medio de socia vundebleco al kiu multaj familioj submetiĝas. La malfacileco por lernado kaj la perturboj kaj teniĝoj postulantaj helpon de profesiulo de la psikologia fako, kiel la kazoj de agresemo, izoleco kaj apatio, estas atente observataj.

kiel fundamentan elementon en la proceso de konstruo de la kono, kaj ankaŭ samtempe kuraĝigas la lernanton sekvi la studojn kaj aliri la akademian vivon. La edukato havas voĉon; li estas esploranto kiu uzas intuicion kaj sin esprimas (skribe kaj parole) sen hezitemo kaj timemo, tipoj de teniĝo ordinare ligitaj al malforta memestimo.

La metodo de LBV investas en *bonkvalitan lernadon cele promocii ensocietiĝon*, ĉar ĝi havigas rimedojn al la lernantoj por ke ili plibone sin preparu por la labormerkato. Surbaze de indicoj montrantaj signifan kreskon en la nombro de universitataj diplomitiĝantoj, oni povas havi la impreson pri tio ke diplomo de supera edukado reprezentas eble la

[*2] ***Tabula rasa* [Glatigita tabulo]** — Empiriisme (filozofia skolo defendanta kiel unika origino de scio la sperton, tion akireblan el la ekstera mondo), *tabula rasa* (latina esprimo) estas kondiĉo, kiu karakterizas malplenan menson, antaŭanta iun ajn konon akiritan pere de la sentumoj.




## “Socia”

Ĉe LBV oni elstarigas la praktikon de komunuma laboro inter la lernejo kaj la familio. Estas esenca la organiza partopreno de la gepatroj en la lerneja vivo de la gefiloj. Kiam la lernejo konas la sociekonomian realaĵon de la familio, eblas kontribui al la plifortigo de sentaj alligitecoj. La familio bezonas akceptemon, kuraĝigon kaj orientadon por ke ĝi strebu superi la malfacilaĵojn, identigu kaj plibonigu siajn lertecojn. Pere de ekzercado de valoroj prilumitaj de la Ekumena Spiritualeco, oni promocias la Kulturon de Paco en la lernejoj de LBV, kie cetere la indico de antaŭtempa forlaso de lernejo estas nulo.




## “Bio” (biologia)

Inkluzivas la zorgojn de kuracistoj, dentistoj kaj nutristoj. La fizika sano estas planita kiel preventa maniero, aldone de orientado kaj informoj al la familioj pere de prelegoj, diversaj faldfolioj kaj san-programoj ilin favorigantaj. La bonstato de la korpo estas esenca por la bona disvolvo de la eduka proceso.

unikan pasporton al la plena ensocietiĝo. Sendube, la universitata diplomo signifas novajn kaj promesdonajn vojojn en la profesia kampo. Estiĝas tamen kelkaj demandoj. Ĉu diplomitiĝo, per si mem, garantias ensocietiĝon? Ĉu la konoj akiritaj en la universitata supera kurso difinas la bonan profesiplenumon? Ĉu la individuo kun diplomo, nur pro tio, kapablas esprimi kaj apliki la akiritajn konojn?

Por plibone analizi tiajn rimarkindajn demandojn, ni atentu la vortojn de la ĉefgvidanto de LBV, en lia libro *Urĝas reeduki!**[3] *“(...)* ***Efika preparo****: La Spirito havas distingan lokon en nia laboro. Tamen, dum edukado de junuloj kaj plenaĝuloj por la memsubteno en ĉi tiu materia mondo de teknologio neniam antaŭe vidata*

---

*[3] ***Urĝas reeduki!*** — Furoraĵo de la verkisto Paiva Netto, jam disvendiĝis pli ol 230 mil ekzempleroj. La verko aperas ankaŭ en la retkatalogo de Eldonejo Elevação sekve de partnereco kun Submarino Digital/Gato Sabido.


School Picture

*— kaj paradokse nuntempe tiel nestabila al tiuj laborantaj por propra estonteco —, ni devas plej alte konsideri tion ke la edukatoj bezonas esti efike preparitaj por la prema postulo de nuntempa labormerkato. Kaj plie: per tia maniero ke ili ne laŭiru vojon en kiu la profesio, por kiu ili sin preparis, malaperu fine de la kurso. Estas esence do ke ili ricevu efikan formadon por ke ili estu aŭdacaj, entreprenemaj, tiel ke ili povu superi la postajn okazaĵojn kiuj, en iu ajn momento, defias la socion, timigante popolamasojn. (...) Neniom efikos do — se tiel argumenti —, aŭdacaj planoj, se ne estos iu konvene instruita por disvolvi ilin".*

La instruisto de la lernejoj de Legio de Bona Volo zorgas pri la defia realaĵo de la 21a jarcento kaj tial li prilaboras la konajn aspektojn kunligitajn al la Ekumena Spiritualeco. Tiamaniere difiniĝas plej bonkvalita pedagogia enteno, esenca por la pli novaj profesioj, preparante la lernantojn por kreskantaj defioj. Konscia pri la valoroj etikaj, ekumenaj kaj spiritaj kiuj konsistigas la konceptajn fundamentojn de la pedagogio aplikata en lernoĉambro, la edukisto plifortigas la lertecojn kaj kompetentecojn de la edukatoj. Tiel, ĝojigas nin la agado de dediĉaj profesiuloj, kiuj vidas sin mem kiel kunaŭtoroj por konstruo de Solidara, Altruisma, Ekumena Socio, unu el la ekzisto-kialoj de Legio de Bona Volo. Certe ĉi tiu jarmilo dankas. ●

> "Kiam ĝusta, Edukado liberigas. Kaj kune kun Ekumena Spiritualeco, ĝi sublimigas."
> **Paiva Netto**




## Sciu kie troviĝas LBV-on

**CENTRA SIDEJO:** Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com • **LBV DE ARGENTINO:** Av. Boedo, 1.942 • C1239AAW • Buenos Aires • Tel.: (+5411) 4909-5600 • www.lbv.org.ar • **LBV DE BOLIVIO:** Calle Asunta Bozo Bistrot 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo • **LBV DE USONO:** 36 W 44th Street Mezzanine • Manhattan • New York • 10036 • Tel.: (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org • **LBV DE PARAGVAJO:** Calle Curupayty, 1452 • Barrio Villa Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/3 • www.lbv.org.py • **LBV DE PORTUGALIO:** Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto • CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt • **LBV DE URUGVAJO:** Av. Agraciada 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790 • www.lbv.org.uy

PACO SUR LA TERO AL LA HOMOJ DE BONA VOLO
LBV


**Helpu! www.legionofgoodwill.org**

Banko Santander: Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

Banko HSBC: Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24

# NOVAĴOJ

Jéssica Botelho



**Fabiano Henrique**
Niterói, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. Esperantisto ekde 1997. Redaktoro de la programo *Esperanto, la Lingvo de Frateco*, de Radio Rio de Janeiro.

## Komunumo memorfestas la 125-jariĝon de Esperanto

La itala prof-ro Renato Corsetti iniciatis internacian kampanjon por la celebrado de la 125 jaroj de Esperanto. Oni festis la jubileon la 26an de julio, dato en kiu L.L. Zamenhof aperigis la unuan libron pri la lingvo.

Corsetti proponis la estigon de laborgrupo por diskonigi la temon tutmonde. Du el ili fariĝis la agadkampo gvidata de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

La unua antaŭvidas la okazigon de retkursoj pri la neŭtrala helplingvo. Pri la dua, la enlandaj asocioj elektos respondeculon en la fako informado, por agadi kiel peranto de publikaj rilatoj.

## Nova ludo en Esperanto

Aŭstraliaj esperantistoj kreis la tabulan ludon Triba Vivo, kies kartoj kaj reguloj estas skribitaj en Esperanto.

## Ĉina universitato kreos Esperantan Muzeon

La Universitato de Zaozhuang, en Ĉi-nio, kreos Esperantan Muzeon. Laŭ fontoj ligitaj al la institucio, per tio oni celas protekti la esperantan kulturon, diskonigante ĝin al la ĝenerala publiko. La materialo eksponota estos arangita laŭ landorigino. Oni petas donaĵojn por formigo de la kolekto. La Esperanta Muzeo de Zaozhuang fariĝos la unua siaspeco en Azio.

## Jam enretigita la plej konata vortaro de Esperanto

La plej fama vortaro de Esperanto jam estas konsultebla per interreto. PIV (Plena Ilustrita Vortaro) estas senpage alirebla. La enretigo estis plenumita komence de Aprilo. Informfontoj el la eldonejo SAT asertis, ke kelkaj eraretoj povas okazi, ĉar temas pri prova versio. La projekto kostis proksimume 10 mil eŭroj. Tiu monsumo estis enspezita pere de internacia kampanjo. Antaŭ ol konsulti la vortaron, la vizitanto devas unue registriĝi ĉe la adreso www.vortaro.net.

## Internacia konferenco utiligis Esperanton kiel laborlingvon

Esperanto estis laborlingvo de internacia konferenco en Eŭropo. La evento havis lokon en Triesto (Italujo), de la 9-a ĝis la 12-a de Majo. La temo de la aktivaĵoj estis *Kiel estus Eŭropo, se Eŭropa Unio ne ekzistus?*. La diskutrondoj estis direktitaj ĉefe al junuloj. Partoprenis universitataj studentoj de Italujo, Slovenujo, Kroatujo, Aŭstrujo, Slovakujo, Ĉeĥujo, Britujo kaj Francujo. La debatoj de la grandaj konferencoj okazis en la itala, angla kaj esperanta lingvoj. El kvin laborgrupoj, unu funkciis tute en la neŭtrala idiomo.

## Tri landoj kune organizas esperanto-kongreson

Germanujo, Danujo kaj Pollando organizis Komunan Kongreson de Esperanto. La celo estas okazigi en unusola loko la naciajn tiaspecajn eventojn de tri limnajbaraj landoj.

La aktivaĵoj havis lokon en Berlino, inter la 25-a kaj la 28-a de Majo. La temo de la diskutoj estis la integriĝo de eŭropaj landoj.

La programo konsistis el promenadoj, debatoj, lecionoj kaj artaj prezentadoj.

## Okazis en Junio la usona Esperanto-sezono

Inter la 22-a kaj la 25-a de Junio okazis la Nord-Amerika Kongreso de Esperanto. Tiu evento havis lokon en Universitato de Teksaso, en la urbo Dalaso. Samloke, de la 25-a de Junio ĝis la 4-a de Julio, oni okazigis la tradician someran sezonon de kursoj de Esperanto de Usono (NASK).

## Esperanto estis vigle disvastigata ĉe Rio+20

Esperanto-movado vigle partoprenis la internacian konferencon Rio+20. En tiu ĉi jaro unu el la ĉefaj propagandaj strategioj estas enmiksi la Internacian Lingvon en la kuntekston de la protekto de lingvaj rajtoj. La esperantista movado partoprenis en la Kupolo de la Popoloj, en Aterro do Flamengo, disvastigante la idiomon pere de ĉemizoj, afiŝoj, rubandoj kaj flugfolioj, sub la aŭspicio de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Okazis ankaŭ la partoprenado dum eventoj estigitaj de pluraj sociaj organizoj, ĉiam atentigante la ĉeestantojn pri la graveco de Esperanto.



# TBV estas oficiala turisma vojiro de la Monda Pokalo 2014

Janine Martins

**Aklamita kiel unu el la Sep Mirindaĵoj de Braziljo/DF, Brazilo, la Templo de Bona Volo, plej granda simbolo de la Dia Ekumenismo, estas la monumento plej vizitata de la ĉefurbo de Brazilo, laŭ oficialaj datumoj de la Ŝtata Sekretariejo pri Turismo de la Federacia Distrikto (Setur). Ekde kiam ĝi estis fondita de Paiva Netto, en 21/10/1989, ĝi jam ricevis pli ol 21 milionojn da pilgrimantoj. Sur la foto, de maldekstre, la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco, ParlaMundi de LBV, la administra sidejo kaj la Templo de Bona Volo. Vizitu: SGAS 915, Lotes 75/76, Informoj: (+5561) 3114-1070/www.tbv.com.br (disponebla angle, arabe, ĉine, esperante, france, hispane, itale kaj portugale).**



André Fernandes

En la komenco de Marto, la enlanda Konsilio pri Disvolviĝo de Turismo de la Federacia Distrikto (Condetur/DF, portugale), sendis al la Federacio Internacia de Futbalaj Asocioj (FIFA) liston de la dek lokaj vidindaĵoj de la ĉefurbo de Brazilo, kiuj turisme elstariĝos dum la Monda Pokalo de futbalo 2014. Inter la elektitaj, aperas la Templo de Bona Volo (TBV), la Piramido de la Lumaj Spiritoj kaj de la Benitaj Animoj.

La ekumena monumento estis menciita de *Jornal de Brasília* (grava ĵurnalo de la brazila ĉefurbo) en ĝia vendreda eldono, la 2-an de marto. *"Kun tute neriproĉebla aspekto estas la Templo de Bona Volo kaj la Memorigejo JK. La templo estas alternativo por tiuj, kiuj serĉas internan pacon per meditado kaj preĝo; ĝi havas plurajn artajn lokojn, por studado kaj meditado"*, elstarigas la raporto.

La anonco pri la dek monumentoj elektitaj de Condetur aperas en amaskomunikiloj de la tuta Brazilo, kaj ankaŭ en la retejo mem de la Sekretariejo pri Turismo kaj de la ĵurnalo *Tribuna do Norte* kaj en la retpaĝaroj *Clica Brasília* kaj *Mercado e Eventos.*




Paulo César

# Grupo de esperantistoj vizitas la Templon de Paco

La 18an de Januaro, grupo de esperantistoj vizitis la Templon de Paco. Disvastigantoj de la planlingvo plej parolata en la mondo kunveniĝis en la brazila ĉefurbo okaze de la 47a Brazila Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en la urbo Taguatinga, en la Federacia Distrikto, inter la tagoj 15a kaj 19a.

Ekde matene, reprezentantoj de la esperanta movado el pluraj lokoj alvenis al la monumento plej vizitata en la brazila ĉefurbo. La vizitantoj estis gvidataj kaj kondukataj tra diversaj ejoj de la Templo de la Benitaj Animoj.

Tre emociita kaj kontenta reveni al TBV, la esperantisto el la brazila Subŝtato Bahia, **José Saraiva Matos**, legia veterano de la Bona Volo de Dio, 94-jaraĝa, memorigis, ke li ĉeestis en la inaŭguro de la monumento kaj ankaŭ substrekis ke li ĉiam akompanas la programon de Superreto Bona Volo pri Komunikado.

Pri la Ekumenismo de la Templo de Paco, la esperantisto **Mário Fonseca**, el Alto Paraíso de Goiás, en la subŝtato Goiás, diris: *"Legio de Bona Volo estas interesa ekzemplo de Ekumenismo, pere de kiu tiuj baroj, nome kredoj, estas ankaŭ superitaj, cele al efektiva formiĝo de planeda interhoma unuiĝo. Ankaŭ Esperanto tre afiniĝas al la idealo de Bona Volo; tial, mi sentas min komforta kaj ĝoja ĉi tie, kvazaŭ mi estus en mia domo"*.

Fotoj: André Fernandes


Navo de TBV


Artgalerio


Sankta Fonto

*"Mi estas gape emociita, ĉar TBV estas nepriskribebla. Komence de mia junulineco, mi havis la ĝuon konatiĝi kun la unuaj eldonoj de la revuetoj de LBV, kiuj tiam jam diskonigadis Esperanton"*, memorigis s-ino **Therezinha Conceição**, kiu unuafoje vizitis la monumenton. Kaj ŝi plu diris: *"Kiam mi eniris en la Navon, kie mi sekvis tiun vojon sur la Spiralo, mi sentis min kvazaŭ ekster mia korpo. Se mi povus, mi ne plu elirus de tie! Tio estas plenpaco. Nepriskribeble, mirinde!"*.

Lucian Fagundes







# LA GRANDA HOMAR-FAMILIO

## Junuloj de Bona Volo debatas pri la spirita signifo de familio

Fotoj: Arkivo BV






Ĉar fariĝas pli kaj pli klara kaj diskonata la graveco pri tio ke ĉiuj vidu unu alian kiel loĝantoj de unika loĝejo, nome la planedo Tero, la Religio de Dio — alidire, la ekumena religio de Brazilo kaj de la mondo —, invitas nin plivastigi niajn rilatojn kun aliaj kunloĝantoj de ĉi tiu *habitat*, kun la certeco ke ni formas unu solan familion kaj ke la harmonio kaj daŭripoveco de nia komuna domo fariĝas ĉies respondeco.

La defio, lanĉita de la prezidanto-predikanto de la Religio de la Frata Amo, Paiva Netto, kuraĝigas gejunulojn je ĉiuj aĝoj kompreni la grandiozan spiritan signifon, kiun la familio ludas en la planeda skalo, kaj krome antaŭenpuŝas agadojn por socia konsciiĝo pri tiu temo. Paiva Netto asertas: *"Mi respektas la opinion de tiuj, kiuj prognozas kiel nepre okazontan fakton la malaperon de familio. Tamen, mi dubas pri ilia rezono, kiam ili asertas, ke ĝia valoro por plifortigo de la socio atingis sian finon. Nu, socio ne ekzistas sen familio. Kaj neniu ŝanĝo sur la Tero okazis pace. En la 9a Kongreso de la Legia Junularo de LBV, en la jaro 1984, mi diris, ke en mondo konstante minacata de sovaĝo, konvenas rememori, ke post falo de baroj spacaj kaj tempaj, ju pli oni anoncas ĝian finon, des pli la familio kreskas kaj nomiĝas Homaro"*.

Tial, la 37a Internacia Forumo de la Aganta Junulo de la Bona Volo de Dio pritraktis la temon "La Granda Homar-familio", per prezento de debatoj, sociaj



kaj mediaj aktivadoj, aranĝoj pri arto, kulturo kaj komunikado. La evento, komenciĝinta en la dua sesmonato de 2011, finiĝis la 30an de junio 2012 en pluraj brazilaj urboj kaj ankaŭ en Argentino, Bolivio, Paragvajo, Urugvajo, Portugalio kaj Usono.

La solenaĵo, prezentita de la kreinto kaj gvidanto de la Junulara Movado, estis la momento plej atendata de ĉiuj. Satelite elsendata tutmonde pere de Superreto Bona Volo de Komunikado (Radio, TV kaj Interreto), Paiva Netto salutis la aktivulojn de la Tero kaj de la Ĉielo, instigis ilin al agado je la Bono, kun kuraĝo kaj persisto, favore al ĉiuj popoloj, kaj familie festis siajn 56-jarojn da laboro en la Institucioj de Bona Volo, atingitajn la pasintan 29an de Junio.

## Internacia Festivalo de Muziko, de LBV

La Internacia Muziko-Festivalo, de LBV, estas alia allogaĵo de la evento. Malfermaj al la partopreno de muzikistoj, komponistoj kaj la ĝenerala publiko, tio estis okazo por transdoni, per muzika lingvo, bonajn valorojn novige, kreeme kaj fratece. La komponaĵoj, premiitaj laŭ ĉiu enlanda regiono, estas produktataj kaj registritaj en la studio de diskeldonejo Som Puro por disaŭdigo pere de la komunika Reto de Bona Volo kaj de partneraj komunikiloj, diskonigantoj de la Ekumena mesaĝo de tiu Movado.

## Spiritaj kaj Kulturaj Rondoj, de LBV

Evento ĉiujare realigata de la Ekumena Junularo de Legio de Bona Volo, enkadre de la Internacia Forumo de la Agema Junularo de Bona Volo de Dio.

Gvidita de temo, al la partoprenantoj oni ofertas metiejojn pri komunikado, fotado, muziko, literaturo kaj aktorado.



# INSTRUIS JESUO, LA EKUMENA KRISTO, LA DIA ŜTATISTO:

"Novan Ordonon Mi donas al vi: Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis. Nur per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj. (...) Neniu havas Amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian Vivon por siaj amikoj." (Evangelio de la Kristo, laŭ Johano 13:34 kaj 35 kaj 15:12 kaj 13.


"La Traktaĵo pri la Nova Ordono de Jesuo signifas por mi ke Jesuo estas Vivo kaj ke Li neniam forlasas nin. Li amas nin, protektas, zorgas, karesas nin kaj al Li ne plaĉas vidi nin kverelantaj, kaj tial ni devas multe ami unu alian. Ne militi. Multe ami nin reciproke kiel Li nin amas."

Soldateto de Dio: Korin Cristal Velasquez Moscos, 9-jara — Bolivio.



Malena Moscoso

## FOTOGALERIO



Adrian Lucius kaj Bryan Alexander Fernandez de Albuquerque (5-jara) — Usono.



Fotoj: Persona Arkivo



Fotoj: Persona Arkivo

Thiago, tiam 9-jara, Bianca, tiam 2-jara, kaj Rodrigo Gabriel Chineppe, tiam 8-jara — Montevideo, Urugvajo.



Rafaela Alessandra, tiam 2-monata. Gepatroj: Silvana kaj José António Barduzzi — Lisbono, Portugalio.



João Miguel Junior de Araújo, 8-monata. Gepatroj: Marilza Antonia kaj Paulo Julio de Araújo — Rio-de-Ĵanejro/ RJ, Brazilo.




Sheila Rolón de Almeida, tiam 4-jara — Paragvajo.



Victoria, 7-monata, kaj Agustina Franchi, 10-jara. Gepatroj: Angelina Gaona kaj Daniel Aparecido Franchi — Bonaero, Argentino.

## AKTIVECOJ

**Kiu el la detaloj ne kongruas kun la bildo?**




**Venigu la birdon al ĝiaj idoj.**




**RESPONDOJ:**

Venigu la birdon al ĝiaj idoj.
Respondo: 3

Kiu el la detaloj ne kongruas kun la bildo?
Respondo: 3

# VOCÊ QUER OS CARROS MAIS PREMIADOS DO BRASIL? VOCÊ QUER UM

# Honda!



MELHOR COMPRA QUATRO RODAS 2010 UTILITÁRIO ESPORTIVOS LEVES

PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 MINIVANS

PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 GRANDE VENCEDOR

PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 SEDÃS MÉDIOS

MELHOR COMPRA QUATRO RODAS 2010 CARROS DE 50 000 A 60 000 REAIS

ExpressService

**O Pós-venda Honda foi eleito pela 6ª vez consecutiva o melhor do Brasil. Pode confiar!**

PESQUISA Os eleitOs QUATRO RODAS 2010 ASSISTÊNCIA TÉCNICA

Consórcio Nacional Honda prestações a partir de R$ 793,35*

**Agende um test drive**

**TODOS OS MODELOS COM ATÉ 5 ANOS DE GARANTIA TOTAL!**

HONDA

**RIO TÓKIO - BOTAFOGO**
Rua General Severiano, 201
21 2122-4999
www.riotokio.com.br

**RIO TÓKIO - RECREIO**
Avenida das Américas, 14.001
21 2323-9000
www.riotokio.com.br

**NARITA - BARRA**
Avenida das Américas, 2001
21 3987-8888
www.hondanarita.com.br

A garantia estendida de 5 anos é opcional e possui um custo adicional de R$ 1.850,00. *O valor de R$ 793,35 refere-se a 75% da carta de crédito para aquisição do New Fit LX 1.4 Flex 101cv, câmbio manual, ano 2011/2011, com valor de R$ 41.178,75. Reservamo-nos o direito de corrigir possíveis erros de digitação. Fotos meramente ilustrativas.

RESPEITE A SINALIZAÇÃO DE TRÂNSITO